Amo malkovrita per sonĝo

En tre dista vilaĝo situanta nenombreblajn mejlojn de urboj, kiu enhavas stratojn kun abundo de vendistoj, kaj ĝojoplenaj ridoj de infanoj, tre dista de beletaj pepoj de birdoj, iu junulino sidiĝis surbenke enhavante grandan malĝojon. Ŝi ploregis kovrinte siajn okulojn per siaj manoj. Subite, ŝia animdoloro estis aŭdata de hazarda sciuro, kiu estis serĉanta sian sekvantan manĝon. Ĉi tiu sciuro ne havis ajn decon, ĉar li estis ŝtelisto atendinte la ĝustan oportunon por ekpreni kelke da manĝaĵoj de piedirantoj. Li profitis la okazon, kiam homoj havis haston por hejmiĝo kaj por dorloti siajn infanojn per senfinaj brakumoj. La sciuro alproksimiĝis al la junulino kaj demandis la jenon: Kial vi estas tiel malfeliĉa, mia kara? Ĉu vi ne povas gajiĝi pri la esto de la suno super ni, kiu varmetigas niajn korojn post longa vintro? Ĉu vi ne povas vidi tiujn gepatrojn, kiuj haste iras survoje por renkonti siajn infanetojn, kiuj atendas ilin kun granda deziro por esprimi siajn amojn al ili? Tiu lasta frazo vortigita de ĉi tiu petola sciuro, ial kortuŝis ŝin. La sciuro konfuziĝis, kaj anstataŭ daŭrigi siajn maldecajn aferojn, sidiĝis apud ŝi. Per ĝentila voĉo, li demandis: ĉu iu vundis vian koron? ĉu ia teruraĵo kaŭzis vian malĝojon? Turnante siajn okulojn al li, la junulino komencis ian neantaŭsupozan rakonton.
Ho, kara sciuro, kiu demandis al mi tiojn kun boneco, pardonu min pro tio ke mi ne havas ĝojon same kiel vi pri la hodiaŭa tago kun elstara belo! Tamen, lastan nokton, mi sonĝis pri io, kion mi trovas konfuziga!
Sonĝo? la sciuro scivoleme demandis. Kian ŝongon vi havis mia kara?
Mia sonĝo temis pri mia estonta filo! kiu petis de mi helpon! Tamen, mi ne scias lian fonton de agonio!
Rapide, la sciuro demandis la jenon: sed, ĉi tiu infano ankoraŭ ne ekzistas! Kial vi zorgas pri iu, kiu nur vivas en via sonĝo, mia kara? Tiam, la junulino sekiginte siajn okulojn per blanka tuko, respondis: Tamen, ĉu mi nur devas konservi lin mense? kaj ne donu al li la eblecon por ekzistigi lin? kaj eblecon por klarigi lian agonion al mi? eblecon por krakumi lin?
Havinte surprizon la sciuro enpensiĝis pri ŝia koncerniĝo. Ho! Kiom da amo povas ekzisti ene de la koro de patrino? Eĉ antaŭ la alveno de neekzistanta bebo, ŝi jam zorgas pri li, kaj donas plene ŝian koron al li! Tial beboj gaje feliĉiĝas pri amoplenaj kantoj kantataj de siaj patrinoj! Kiel Dio donacis tian inklinon al la dono de multe da amo? Kiel la ĉeesto de Dio estas tiel evidenta per la larmoj de tiu junulino?

Alparolinte la junulinon kun dolĉa voĉo la sciuro demandis la jenon: Ĉu vi irigu min en vian sonĝon? Mia koro havas urĝon por konatiĝi kun via filo! Lia visaĝo jam venas al mi per imago de li, kiu ridas kun vi! Ho, kara! Tia imagbildo sentigas al mi ĝojon ene de mi!
Ha? tamen, vi nur estas sciuro! Kiel vi povus eniri en mian sonĝon? Sensensaĵon vi diras! Tio ne eblas!
Ho, kara! Vi malestimas la povon de ĉi tiu parolanta sciuro! Prave, ĉirkaŭ la vilaĝo mi estas konata per mia emo al la ŝtelado survoje! kiu nur zorgas pri la teniĝo de ĉiu panero falita de aliaj!
Ho, kara kreitaĵo kovrita per feloj! Pardonon mi petas de vi! Intencon mi ne havis por vian korsenton vundi! Ho, Mi sentas min kulpa pri miaj supozaj asertoj! Ĉu vi pardonus min?
Prave, ne taksu min kiel sciuro, kiu inklinas al la trompo al aliaj! Ĉiaokaze, ĉu vi donus al mi permeson por koni vian nomon?
Jes, unue dankon pro via pacienco donita al ĉi tiu malsaĝulino! Mia nomo estas Aquamarine. Kiel vi nomiĝas?
Mia nomo? Ho, kara! Vi estas la unua persono, kiu demandis al mi tion!
Ĉu vere? La nehavo de nomo devas malfeliĉigi vin!
Male, mia kara! Ho, pardonon Aquamarine! Nomon mi ne bezonas, tial ke ĉiu estaĵo en ĉi tiu arbetaro traktas min kiel familiano! Tamen, ne deturnu min de mia demando: Kial vi pensas, ke via filo malĝojas?
Ha, (Aquamarine, subite ekĝemis kun malplaĉo) Li nur sidiĝas rigardante ian lagon silente! Neniam mi aŭdis ajnan vorton de li! Eĉ panjon li ne ankoraŭ diris! Li nur estas tie nehavanta ajnan rideton survisaĝe! Li estas senmova, rifuzante intertrakton kun la resto de infanetoj en la parko!
Hmm, ĉu vi menciis la lagon, kiu disigas lumetojn el diversaj koloroj?
La sciuro restis kviete por unu aŭ du minutoj, kaj poste li diris: eble vi devus iri tien kaj sidiĝu apud li kaj kune rigardu la lagon.
Sed, mi bezonas aŭdi de li la jenon: Panjo! Mi bezonas vin! Mi amas vin!
Provu mian proponon! respondis la sciuro. Amo ne ĉiam estas donita per vortoj, sed foje per nur reciproka rigardado! almenaŭ tion mia amiko, la anaso, diris al mi.
Aquamarine dubis pri tia propono, kaj pensis ke la sciuro trompis ŝin. Tamen, ŝi tre forte volis forigi la malĝojon de sia filo, do ŝi faris tion, kion la sciuro proponis.
Kaj patrino kaj filo kviete sidiĝis apud si, rigardinte la belajn brilojn disigitajn de la lago. Aquamarine surpriziĝis pri ĝia enhavo de belo! Subite, la infaneto turnis sin al sia patrino, rigardinte ŝiajn okulojn! Nenian

vorton ambaŭ koroj bezonis por senti AMON! Ŝi diris al li: Ho, mia filo, kialon por restadi ĉi tie vi donis al mi! por restadi tiel por ĉiam!
Kvankam, ĝi estis sonĝo, tiaj vortoj ŝajnis haltigi la tempon por ĉiam!

2026, Author: Eduardo Alejandro Grando.

This work is licensed under a Creative Commons Attribution 4.0 International License (CC BY 4.0)

You are free to share and adapt this work, as long as you give appropiate credit to the author.